

KATALUNA ESPERANTISTO

DUMONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



JULIO-AUGUSTO 1930

N-RO 172

“Kataluna Esperantisto”

APEROS REGULE DUMONATE

EN SIA TRADICIA FORMO

ABONU!

HELPU!

“Kataluna Esperantista Federacio”

OKAZIGOS LA PROKSIMAN KONGRESON

KAJ INTERNACIAJN FLORAJN LUDOJN

EN

GRANOLLERS 1931

KATALUNA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

ADRESO: Duran i Bas, 8 - BARCELONA

JARABONO:

Enlande: 5 pesetoj
Eksterlande: 6 pesetoj

DIREKTORO:

JAUME GRAU CASAS, L. K.

EDITORIAL

Amb esperit de sacrifici i desitjant salvar la "Federació Esperantista Catalana" de la més forta crisi que mai hagi sofert, emprenem altra vegada la publicació d'aquesta revista.

Volem fer-la servant fidelitat a la tradició de la K. E. F. i mostrant una continuïtat encoratjadora... Però no podem fer-nos solidaris dels qui darrerament han prostituït la nostra ànima i han ignorat la història de la nostra Federació i de la nostra Revista. No es podran queixar, doncs, que els foragitem de la nostra llar i de la nostra memòria.

Considerem autèntics els números de l'òrgan oficial de la K. E. F., que indiquem a continuació, publicats en diverses èpoques sota la direcció de Domènec Sardà, Frederic Pujulà, Josep Grau Casas, Marian Solà, Jaume Grau Casas, Delfí Dalmau i S. Alberich Jofrè:

"Kataluna Esperantisto". (Primera època). Núms. 1-71.

"Bulteno de la K. E. F." Núms. 1-13.

"Kataluna Esperantisto". (Segona època). Núms. 1-36.

"L'Esperantista Català". Núms. 1-3.

"Kataluna Esperantisto". (Tercera època). Núms. 1-48.

Í com que han sortit, en total, 171 números *genuïns* del nostre òrgan oficial, donem al present quadern de "KATALUNA ESPERANTISTO" el número 172.

Des d'ara "Kataluna Esperantisto" sortirà cada dos mesos, en quaderns de 16 pàgines. Subscripció: Ptes. 5 a l'any. (La subscripció corresponent al segon semestre de l'any actual, val solament Pessetes 2'50). Del sosteniment i administració de la nostra revista,

en tindrà cura la "Eldona Fako" de K. E. F., autònoma, amb caixa a part.

El pertànyer a la Federació (sense tenir dret a la revista, a la qual cal subscriure's a part), costa Pessetes 2'50 cada any per als esperantistes que no pertanyen a cap grup, o Pessetes 0'30 cada trimestre per als esperantistes que acrediten pertànyer a un grup.

Volíem fer en aquest número la ressenya del darrer Congrès i Jocs Florals Internacionals, de Vinaroç; però no ens ha estat possible trobar el material necessari. Consti, doncs, que nosaltres no negligim aquest assumpte.

Si algú sap a mans de qui han anat a raure la Memòria del Secretari dels Jocs Florals, el Discurs del President, la poesia guanyadora de la Flor Natural i altres treballs premiats, li agraïrem que ens ho digui.

Creiem que la nostra Revista, en la seva modesta forma actual, té l'existència assegurada. Però ens cal l'ajut de tots els esperantistes de terres de llengua catalana, que mai no han negat llur cooperació a tota obra profitosa per a l'Esperanto. Preguem a tothom la tramesa de l'import de la subscripció, i agraïrem, als qui poden fer-lo, un donatiu exclusivament destinat a fer viure "Kataluna Esperantisto".

No volem fer promeses. Hom anirà constatant les realitats. Ens proposem reconquerir el terreny perdut i, encara, eixamplar el nostre camp d'acció. Cal solament que el fervor reneixi en tots els cors, i que entre els lectors de "Kataluna Esperantisto" i els qui malgrat la feixuga tasca quotidiana trobem temps per a redactar-lo i administrar-lo, hi hagi una comunicació vibrant, cordial, entusiasta...



MONDONACOJ POR "KATALUNA ESPERANTISTO"

Joan Gili Norta	Pesetoj 25
Eduard Capdevila.	" 25
Jaume Grau Casas	" 25

PRI IBERIA KONFEDERACIO

Nun kiam nia "Kataluna Esperantista Federacio" denove reprenas sian tradicion — longe forlasitan pro la hontigaj cirkonstancoj en kiuj vivis nia nacio dum ses longaj jaroj —, prezentiĝas al ni, katalunaj esperantistoj, problemo kies solvo urĝe devas esti serĉata. Nome, tiu pri la konfederaciigo de la naciaj esperantaj organizaĵoj ekzistantaj en Iberio.

Ke tiu afero estas gravega kaj urĝa, estas ja en la konscio de ĉiu kiu sin nomas esperantisto en la Iberiaj landoj. Unuigo estas fortigo; fortigo kunportas efikon kaj sukceson...

Sed, tial ke kelkajn fojojn dum malmulta nombro da jaroj malsukcesis la klopodoj de eminentaj katalunaj kaj eksterkatalunaj samideanoj, starigi Iberian Esperantan Konfederacion, mi timas saman malsukceson en la nuna momento, se el inter la kataluna kaj eksterkataluna esperantistaro ne malaperos la malkomprenaĵoj ĝis nun apartigantaj la konfederaciigontojn.

Por helpi, laŭ mia povo kaj mia scio, al plena interkonsento de unuj kun la aliaj, jen mi volas nun elmontri kion mi farus se nur de mi dependus la serĉata solvo. Unue mi diros kion devus fari la katalunoj, poste kion mi farus estante eksterkataluno.

Mi, kiel kataluno, antaŭ ĉio rekonus la fakton ke mia nacio apartenas ankoraŭ, laŭleĝe, al difinita ŝtato, kaj sekve de tiu rekono mi konkludus ke unuigo kun la aliaj samŝtataj esperantistoj, forte efikus la poresperantan laboradon, precipe en oficialaj rondoj. Eĉ, se tro malfacila estus la starigo de Iberia Konfederacio — ĉu pro neekzistado de organizaĵo en iu iberia nacio, ĉu pro aliaj kaŭzoj —, mi ne kontraŭstarus la fondon de hispanŝtata konfederacio.

Por mia sincera kaj entuziasma kunlaborado kun la eksterkatalunoj, mi nur proponus la akcepton *sine qua non* de tio, kion mi akceptus se mi estus eksterkataluno.

Se mi estus eksterkataluno, antaŭ ĉio rekonus:

Unue: La fakton ke en la nuna hispana ŝtato ekzistas diversaj nacioj. Por ni, esperantistoj, la nacioj distingiĝas laŭ lingvoj.

Due: Ke tiuj diversaj nacioj rajtas organizi sian poresperantan agadon tute libere kaj sendepende. Apartenado aŭ neapartenado al enŝtata konfederacio, dependas rekte de ili kaj neniam neapartenado rajtigus la aliajn federaciojn aŭ konfederacion, invadi la teritorion de la rifuzinta organizaĵo.

Trie: Ke, sekve, la starigota konfederacio sin devus regi per regularo tia, en kiu klare kaj nepre estus deklarata tiu aŭtonomeco de la naciaj federacioj, en ĉiuj aspektoj, kaj en kiu estus evitata la ebleco de centralismo, kiu povus kunporti la danĝeron de

diktatoreco de ia organizaĵo aŭ individuo super la tuta konfederacio.

Mi tute sincere opinias, ke sur tiu reciproka interkonsento oni povus entrepreni la taskon realigi la Iberian Konfederacion, en plena konkordo kaj amikeco, kun la certeco pri sukceso kaj profito por Esperanto.

Artur DOMENECH MAS

DUA ELDONO DE "KATALUNA ANTOLOGIO"

Ni ĝojas sciigi niajn legantojn, pri tio ke estas jam maŝinkompostita pli ol la duono de la teksto de "Kataluna Antologio" kaj baldaŭ oni komencos la presadon en la bonega presejo "Tipografia Catalana".

La eldono konsistos el 1.500 ekzempleroj, en tre bona papero, kaj estos farata de "Editorial Ibérica".

La nombro da paĝoj estos 416, kiel en la unua eldono; estis neeble, pro manko de loko, enmeti en la duan eldonon de K. A. novajn aŭtorojn. Espereble, post sukceso de tiu dua eldono, oni faros *aldonon* al la "Antologio", ebligontan plenan superrigardon al la vasta panoramo de la kataluna literaturo.

PRIMER MANUAL D'ESPERANTO

Jam aperis la kataluna traduko de la fama franca lernolibreto "Premier Manuel d'Espéranto", vulgare konata sub la nomo "Ruĝa Broŝuro".

Ĉiuj konas la plenan taŭgecon de tiu lernolibro, ne sole rilate al ĝia didaktika aranĝo, sed ankaŭ rilate al ĝia ekstrema koncizeco.

La prezo de ĉiu ekzemplero estas 25 centimoj, kaj oni faras al la Grupoj 20 % rabaton. Aĉetu kaj disvastigu grandnombre nian Ruĝan Broŝuron!

La eldono estas farita de la Eldona Fakto de "Kataluna Esperantista Federacio". La adaptaĵo, de S-ro J. G. C.

LA ELSORĈIGO, de Pierre Loti

(Romano pri la modernaj turkaj haremoj.)

Andreo Lhéry, konata romanverkisto, tede malfermadis siajn poŝtaĵojn, en pala printempa mateno, apud la bordo de Biskaja maro, en la malgranda domo kie lia lasta fantazio tenis lin preskaŭ fikse, de post la lasta vintro.

“Multe da leteroj, tiun ĉi matenon, li sopiris, tro da leteroj.”

La tagojn kiam la leterportisto alportis pli malmulte da ili, li ankaŭ ja ne estis kontenta, kredante sin subite izola en la vivo. Virinaj leteroj, plej ofte, unuj kun subskribo, aliaj ne, alportantaj al la verkisto la incenson de ĝentilaj intelektaj adoradoj. Preskaŭ ĉiuj komenciĝis tiel: “Vi certe miros, sinjoro, vidante la skribaĵon de virino kiun vi tute ne konas.” Andreo ridetis de tiu komenco: miro, ha! ne, jam de longe li ĉesis miri pro tio. Poste, ĉiu nova korespondantino, kiu ĝenerale kredis sin la sola en la mondo sufiĉe kuraĝa por tia entrepreno, neniam ŝparis tiun frazon: “Mia animo estas fratineto de la via; *neniu, mi povas tion certigi al vi, iam komprenis vin kiel mi.*” Al tio Andreo tute ne ridetis, malgraŭ la malnoveco de la aserto; kontraŭe li sentis sin kortuŝata. Kaj, cetere, la konscio kiun li havis de sia influo super tiom da disaj kaj por ĉiam malproksimaj kreitaĵoj, la konscio de sia parto de respondeco en ilia evoluado, ofte revigis lin.

Kaj, ankoraŭ, inter tiuj leteroj, troviĝis kelkaj tiom malafektaj, veraj helpopetoj, adresataj al pli granda frato kiu ne povas ne kompreni kaj kompati! Tiujn ĉi Andreo Lhéry flankenmetis, jam ĵetinte al paperkorbo tiujn afektajn kaj banalajn; li konservis ilin kun firma intenco respondi. Sed, plej ofte, ve! tempo mankis, kaj la malfeliĉaj leteroj amasiĝis, baldaŭ dronis sub la fluo de la sekvantaj kaj estis forgesataj.

La poŝto de tiu mateno alportis leteron stampitan el Turkujo, kun poŝta stampo kie oni legis, pure kaj klare, tiun nomon ĉiam konfuzigan por Andreo: Stambul.

Stambul! En sola tiu nomo, kia elvokanta sorĉo!... Antaŭ ol ŝiri la koverton de tiu, kiu ja povis esti tute senvalora letero, Andreo haltis, traskuata subite de tiu ekstremo, ĉiam la sama kaj de esence neesprimebla speco, kiun li ĉiam spertis kiam Stambul elvokiĝis neatendite en la fundo de lia memoro, post kelkaj tagoj da forgeso. Kaj kiel, jam tiel ofte en revo, urbosilueto skiziĝis antaŭ liaj okuloj, kiuj la tutan teron travidis, kiuj trarigardadis la senfinan diversecon de la mondo: la urbo de minaretoj kaj kupoloj, la majesta kaj unika, la ankoraŭ senkompara en sia neevitebla kadukeco, konturiganta en la ĉielo, kun la lazura cirklo de Marmara fermanta la horizonton...

Antaŭ dekkvino da jaroj, li kalkulis, inter siaj nekonataj korespondantinoj, kelkajn belajn senokupulinojn el turkaj haremoj;

unuj koleris, aliaj amis lin kun konscienciproĉoj, ĉar li rakontis en sia unua juneca libro sian aventuron kun iu el iliaj humilaj fratinoj; ili sendis al li sekrete intimajn paĝojn per nekorrekta sed ofte adorinda franca lingvo; baldaŭ, post interŝanĝo de kelkaj leteroj, ili silentis kaj refalis en la netuŝeblan misteron, konfuzaj pripensi sian trokuraĝon kvazaŭ ĝi estus mortpeko.

Fine li ŝiris la koverton stampitan en la kara *malproksima lando*, — kaj la enhavo unue levigis al li la ŝultrojn: ha! ne, tiu sinjorino ja amuziĝis per li! Ŝia lingvo estis tro moderna, ŝia francaĵo tro pura kaj tro facila. Kvankam ŝi citas ja la Koranon, nomigas sin Zahidé Hanum, kaj petas respondon "poŝte restante" kun singardemo de Ruĝhaŭtulo en rabado, tio estas nur sendube iu vojaĝantino travizitanta Konstantinopolon, aŭ la edzino de ambasadora subsekretario, kiu scias? aŭ kredeble orientulino edukita en Parizo?

La letero, tamen, entenis ĉarmon kiu efikis, ĉar Andreo, preskaŭ malgraŭ si mem, respondis tuj. Komprenoble decis ja atesti sian konon pri mahometana mondo kaj diri, tamen ĝentile: "Ĉu vi, turka virino! Ne, vi scias, mi ne lasas min tiel facile trompi!..."

Nekontestebla, kvankam neverŝajna, estis la ĉarmo de tiu letero... Ĝis la morgaŭa tago, kiam, komprenoble, li ĉesis pensi pri ĝi, Andreo havis la nedifinitan senton ke io komenciĝis en lia vivo, io kio havos sekvon, sekvon de dolĉeco, de danĝero kaj malĝojo.

Kaj ankaŭ, tio estis ja kvazaŭ alvoko de Turkujo al la homo kiu tiom ĝin amis iam, sed kiu ne plu revenis tien. La Biskaja maro tiun tagon, tiun duban aprilan tagon, en la ankoraŭ vintra lumo, subite naskis melankolion netolereblan al liaj okuloj, maro pale verda kun la grandaj kirloj de ĝia preskaŭ eterna ondegado, faŭko malfermiĝanta super grandegaĵoj tro senfinaj kiuj allogas kaj malkvietigas. Kiel la Marmara memore revidata, estis pli milda, pli paciga kaj reviga, kun tiu Islama mistero ĉirkaŭ ĉiuj ĝiaj bordoj! La baska lando, kiu iam lin tuŝis, ne plu ŝajnis inda por restado; la spirito de la malnova tempo kiu, iam, ŝajnis al li vivanta ankoraŭ en la pireneaj kamparoj, en la malnovaj najbaraj vilaĝoj, — eĉ antaŭ liaj fenestroj, tie, en tiu antikva urbo Fontarabie, malgraŭ invado de malsaĝaj vilaoj, — la malnova baska spirito, ne, hodiaŭ ne plu estis retrovata de li. Ho! tie, malproksime en Stambul, kiom pli multe troviĝis da pasinteco kaj da malnova homa revado, persistanta en la ombro de la altaj moskeoj, en la stratoj per silento premantaj, kaj en la senfina regiono de tombejoj kie lampetoj kun flava flameto vespere eklumas milope por la animoj de l' mortintoj. Ho! tiuj bordoj kiuj rigardas sin unu la alian, Eŭropo kaj Azio, montrantaj unu la alian minaretojn kaj palacojn laŭlonge de Bosforo, kun senĉesaj aspekto-ŝanĝoj, laŭ ludado de la orienta lumo! Apud la mirpejzaĝo de Oriento, kio pli malbrila kaj pli akra ol tiu golfo de Gaskunjo! Kiel do li restis tie ĉi anstataŭ esti tie, malproksime? Kia malsaĝaĵo perdi ĉi tie

la mallongajn tagojn de la vivo, kiam tie malproksime sidas la lando de facilaj ensorĉoj, de malgajaj kaj dolĉegaj ebriiĝoj per kiuj oni forgesas la forglitadon de la tempo!...

Sed, tie ĉi, apud tiu senkolora golfo, frapita de la batoj kaj ondegoj de Oceano, liaj okuloj malfermiĝis al la spektaklo de la mondo, tie ĉi *la konscienco estis al li donata* por la daŭro de kelkaj preterpasantaj sezonoj; do, ĉion el tiu ĉi lando li amegis tamen, kaj li sciis ja ke tio mankis al li kiam li troviĝis aliloke.

Tiam, en tiu aprila mateno, Andreo Lhery sentis ankoraŭ unu fojon la nekvietigeblan suferon esti disvaginta tra ĉiuj landoj, esti estinta nomado sur tuta tero, alkroĉante sin tie kaj tie ĉi per la koro. Mia Dio, kial li devis nun havi du patrujojn: sian propran, kaj ankoraŭ alian, sian patrujon en Oriento? ...

II

Aprila suno, el sama aprilo, sed el sekvanta semajno, atinganta tra kribrilo de kurtenoj kaj muselinoj, la ĉambron de dormanta junulino. Matena suno, alportanta, eĉ tra kurtenoj, kovriloj, kradoj, tiun efemeran ĝojon kaj tiun eternan trompon de la surteraj renoviĝoj, per kiuj ĉiam lasas sin logi, de la mondkomenco, la simplaj aŭ malsimplaj animoj de la kreitaĵoj, animoj de homoj, animoj de bestoj, animetoj de la kantobirdoj.

Ekstere, aŭdiĝis la bruo de la ĵus alvenintaj hirundoj kaj la obtuzaj frapoj de tambureto frapata laŭ orienta ritmo. De tempo al tempo ankaŭ blekegoj altiĝis en la aero kvazaŭ forŭlovitaj de monstraj bestoj: voĉoj de rapidantaj kurierŝipoj, krioj de vaporfajfiloj, atestantaj la ekziston de haveno, granda haveno freneza de movado; sed tiujn alvokojn de la ŝipoj, oni aŭdis venantajn el malproksimo kaj el *malsupre*, tiel ke oni sentis sin en trankvila kvartalo, sur iu monteto super la maro.

Eleganta kaj blanka, la ĉambro kien enpenetris la suno kaj kie dormis tiu junulino: tre moderna, meblita per la falsa naiveco kaj la ŝajna arkaismo kiuj prezentis ankoraŭ en tiu jaro (jaro 1901) unu el la lastaj rafiniĝoj de niaj dekadencoj, kaj kiu estis nomata la "nova arto". Sur blanke lakita lito, — kie nedifinitaj floroj estis skizitaj, kun miksaĵo de primitiva mallerteco kaj de japana trorafiniteco, de iu laŭmoda dekoraciisto el Londono aŭ Parizo, — la junulino dormis ankoraŭ: meze de la malordo de la blondaj haroj, tute malgranda vizaĝo, el rava ovalo, el ovalo tiel pura ke oni dirus ke ĝi estas ja vaksa statueto, iom neverŝajna pro troa beleco; tute malgranda nazo el preskaŭ tro delikataj flankoj, nepercepteble kurba laŭ falkobeko: grandaj okuloj de virgulino, tre longaj brovoj kliniĝantaj al la tempioj kvazaŭ tiuj de la Virgulino de la Doloroj. Tro da punktoj eble en tukoj kaj kusenoj, tro da brilantaj ringoj en la delikataj manoj, kuŝantaj sur la atlasa kovrotuko, tro da riĉaĵo, oni dirus ĉe ni, por tiel juna

infano; ekster tio, ĉio estis ja konforma, ĉirkaŭ ŝi, al plej lastaj konceptoj de nia okcidenta lukso. Tamen en la fenestroj troviĝis tiuj feraj vergetoj, kaj ankaŭ tiuj lignaj kradoj — nmoveblaj, neniam malfermotaj, — kiuj verŝis super tiun helan elegantecon ian malkvieton, preskaŭ karceran korpremon.

Kun tiu tiel radiantanta suno kaj tiu ĝojega deliro de hirundoj ekstere, la junulino dormadis sufiĉe malfrue, per peza dormo en kiun oni falas subite je la fino de sendormaj noktoj, kaj ŝiaj okuloj montris bluringon, kvazaŭ ŝi estus hieraŭ longe plorinta.

Sur malgranda blanke lakita skribotablo, forgesita kandelo brulis ankoraŭ, inter manskribitaj folioj, tute pretaj leteroj enfermitaj en kovertoj kun oraj monogramoj. Ankaŭ troviĝis tie muzik-papero sur kiu notoj estas skribaĉitaj, kvazaŭ en febro de komponado. Kaj kelkaj libroj kuŝis inter delikataj luksaĵoj el Saksujo: la lasta el Grafino de Noailles, apud la poeziaĵoj de Baudelaire kaj de Verlaine, la filozofio de Kant kaj tiu de Nietzsche... Sendube, patrino ne troviĝis tie por prizorgi la legaĵon, moderigi la survarmiĝon de tiu juna cerbo.

Kaj, tre strange, en tiu ĉi ĉambro kie iu ajn dorlotata Parizanineto sentus sin oportune, tre neatendite super tiu blanke lakita lito, enskribaĵo laŭ arabaj literoj vidiĝis, en la loko mem kie ĉe ni oni alkroĉus eble ankoraŭ la krucifikson: enskribaĵo brodita per oraj fadenoj sur emirverda veluro, frazo el Mahometa libro, kun kurbaĵaj literoj desegnitaj laŭ malnova kaj valora arto.

Duonfrenezaj kantoj kune komencitaj de paro da hirundoj, senhonte lokitaj sur la fenestrorando, subite malfermetigis grandajn okulojn, en la tiel malgranda vizaĝo, tiel malgranda kaj tiel juna laŭ konturoj; okuloj kun larĝaj brune verdaj pupiloj, kiuj unue sendecidaj kaj timemaj kvazaŭ petis kompaton al la vivo, kaj al la *realeco* la ŝarĝon kiel eble plej rapide forpeli netolereblan sonĝon.

Sed la realeco kredeble nur tro fidele akordiĝis al la malbona revo, ĉar la rigardo fariĝis pli kaj pli malgaja, samtempe kiam la penso kaj la memoro revenis; kaj ĝi eĉ tute falis, kvazaŭ senespere subigita al neeviteblo, kiam ĝi renkontis objektojn kiuj eble estis atestaĵoj: en malfermita skatolo, disradianta diademo, kaj sur seĝoj, robo el blanka silko, robo de fianĉino, kun oranĝfloroj eĉ en la ekstremo de ĝia longa treniĝo...

Kvazaŭ ventopelata, senfrape, envenis malgrasa persono, kun ardantaj kaj elrevigitaj okuloj. Nigra robo, granda nigra ĉapelo, kun inda simpleco, severa kun tamen iom da strangeco, preskaŭ maljuna fraŭlino, sed tamen ne tia ankoraŭ; iu instruistino, tion oni divenis, tre diplomita, kaj el bona malriĉa familio.

—Mi havas ĝin!... Ni havas ĝin, mia kara!... ŝi diris france, montrante kun gesto de infana triumfo leteron ne malfermitan, kiun ŝi ĵus deprenis poŝterestante.

Kaj la kuŝanta princineteto respondis per la sama lingvo, sen la plej malgranda fremda akcento.

—Ne, ĉu?

—Sed, jes, ja!... Kies ĝi povas esti, mia infano, se ne *lia*?... Ĉu estas aŭ ne estas *Zahide Hanum* sur tiu ĉi koverto?... Nu!... Ha! Se vi donis la pruntnomon al aliaj, tiam ĝi estas alia...

—Nu, vi scias ke ne!...

—Do, tiam...

La junulino releviĝis, la okuloj nun tre malfermitaj, roza ekbrilo sur vangoj, — kvazaŭ infano suferinta pro grava ĉagreno, sed al kiu ĵus estas donacita tiel eksterordinara ludilo, ke, por unu minuto, ĉio estas forgesata. La ludilo estis la letero; ŝi returnis ĝin en siaj manoj, avida ĝin tuŝi, sed timanta samtempe, kvazaŭ nur tio ĉi estus ja malgrava krimo. Kaj poste, preta ŝiri la koverton, ŝi haltis por peti, kun dorlotemo:

—Bona fraŭlino, kara fraŭlino, ne koleru pro mia fantazio: mi volus esti tute sola por ĝin legi.

—Certe kiel stranga knabino oni ne trovas pli strangan ol vi, mia kara!... Sed vi permesos al mi ĝin rigardi poste, tamen? Tio estas almenaŭ mia plej malgranda meritindaĵo, ŝajnas al mi!... Nu, ĝi estu tiel! Mi iras demeti mian ĉapelon, mian vualon, kaj revenas...

Efektive tre stranga kreitaĵeto, kaj cetere, strange timema, ĉar nun al ŝi ŝajnis ke la decreguloj devigis ŝin ellitiĝi, sin vesti kaj kovri al si la harojn, antaŭ ol malfermi, unuafoje en sia vivo, leteron el viro. Rapide survestinte bluan matenveston, veninta el Rue de la Paix, el bona modisto, poste volvinte sian blondan kapon en gazvualo, iam brodita en Cirkazio, ŝi rompis la sigelon kun ekstremo.

Tre mallonga, la letero; deko da tute simplaj linioj, — kun neatendita paragrafo, kiu ridetigis ŝin, malgraŭ la elreviĝo ne renkonti ion pli konfideman aŭ pli profundan, — ĝentila kaj afabla respondo, danko kie iom da laceco enverŝiĝis, kaj jen ĉio. Sed, almenaŭ, la subskribo estis tie, tre bone legebla, tre efektiva: *Andreo Lhéry*. Tiu nomo, skribita de tiu mano, konfuzigis la junulino kvazaŭ kapturiniĝo. Kaj same kiel li, tie malproksime, akceptante la koverton stampitan en Stambul, havis la impreson ke *io komenciĝis*, tiel same ŝi, tie ĉi, antaŭsentis ion nekonatan, dolĉegan kaj pereigan, pro tiu respondo alveninta ĝuste en tiu tago, la antaŭtago de la plej granda okazaĵo el tuta ŝia ekzistado. Tiu viro de tiel longe reganta en ŝiaj revoj, tiu homo tiel apartigita de ŝi, tiel neatingebla kvazaŭ ĉiu el ili loĝus en malsama planedo, efektive en tiu ĉi mateno ĵus eniris en ŝian vivon, per nur tiu ĉi fakto, kelkaj vortoj skribitaj kaj subskribitaj de li por ŝi.

(Daŭros)

El la franca trad. Marian SOLA, L. K.

KANTO DE LA HUNDOJ

Fajfegas la ventego
 sub peza, nigra nub'.
 De l' vintro du ĝemeloj:
 frapadas neĝ' kaj pluv'.

Sed kiom nin koncernas!
 La bona grand-sinjor'
 en kuirej-angulo
 nin lasas kun favor'.

Pri manĝo ni ne zorgas;
 post lia satmanĝad',
 la niaj estas ĉiuj
 restaĵoj sur la plad'.

Ja vere, ke kelkfoje
 eksonas vipa plaŭd';
 doloras plaŭdo, sed ja
 saniĝas hunda haŭt'.

Kaj se kolero pasis,
 nin vokas la sinjor',
 piedojn liajn lekas
 ni kun feliĉa kor'.

KANTO DE LA LUPOJ

Fajfegas la ventego
 sub peza, nigra nub'.
 De l' vintro du ĝemeloj:
 frapadas neĝ' kaj pluv'.

Ni loĝas en la nuda
 dezerto sen defend',
 ne ŝirmas tie nin eĉ
 arbeto branĉotend'.

Ekstere la malvarmo,
 interne la malsat':
 du niaj turmentantoj
 nin pelas sen kompat'.

Kaj tie, jen la tria:
 pafil' kun kugloŝut'.
 Ruĝiĝas blanka neĝo
 per nia sangogut'.

Ni frostas kaj malsatas,
 hurlante pro l' mizer',
 kun kuglo en la flank'... sed
 ni vivas en liber'!

Aleksandro PETOFI

El la hungara lingvo trad. K. DE KALOCSAY, L. K.

CANT DELS GOSSOS

Bramula la ventada
 i el cel és negre, greu;
 bessons de la hivernada,
 reboten pluja i neu.

Però tant se'ns en dóna!
 El nostre gran senyor,
 d'un bon recó de cuina
 ens fa sempre favor.

Menjar no ens preocupa;
 després que ell s'ha atipat
 són nostres totes, totes
 les deixes del seu plat.

Es cert que es sent a voltes
 xiular fuet rabiós;
 fa mal el cop, prô es cura
 la nostra pell de gos.

I si l'enuig li passa
 i ens crida ja el senyor...
 llavors, els peus llepant-li,
 al cor sentim dolçor.

CANT DELS LLOPS

Bramula la ventada
 i el cel és negre, greu;
 bessons de la hivernada,
 reboten pluja i neu.

Vivim sense defenza
 en mig del nu desert;
 cap arbrissó, cap branca
 allí no ens fa cobert.

Sentim el fret a fora
 i a dins sentim la fam:
 els dos enemics nostres
 no escolten pas cap clam.

Terç enemic encara:
 fusell que encerta el blanc.
 La blanca neu, vermella
 es fa amb la nostra sang.

Vivim en fam, misèria
 i udol desesperat;
 amb una bala al ventre...
 prô sempre en llibertat!

Trad. catalana de Jaume GRAU CASAS, L. K.



LA PETOLAJOJ DE AMO

Ĉapitro VI

Martí, post la tagmanĝo, entreprenis la vojon al la *Comba*, pli frue ol kutime. Estis la horo, kiam la suno havas pli da pezeco, kiam la fosiloj, sen forto por mordi la teron, ĝin gratas kun mallaboremeca bruoj; kiam eĉ la arboj ŝajnas lacaj pro la sunumado kaj montras sian svenecon per la velkado de siaj folioj. Tiam la furiozeco de la somero iĝas nekvietigebla vipado, ĝia tuta ĝojvivo koncentriĝas je la kanto de la cikadoj, ebriaj de lumo.

Martí vojiradis, kun la spirito subpremata de kontraŭaj movoj. Rememorante ĉiujn siajn dumnoktajn pensojn, li al si proponadis, ke li ne kolerigos la familianojn *Cogull* per senutila enamiĝado je *Lina*. Li tro respektadis la memoron de la mortinta amiko, kun tiu altareto sur la komodo — la portreto, la floroj el drapo, la kandelingoj — kie *Teresa* kaj li servadis daŭran kulton, por fermi al si la pordon de la *Comba* kaŭze de sencerbulino, ĉar tia li konceptis *Lina*'n. Li tamen bedaŭrus ke fratinoj *Cori* kaj *Lina* estu forlasintaj la farmodomon. Estis gaja la somertempo kun ili. Kaj la spektaklo de la *Cogull*'oj enamiĝintaj, fariĝadis preskaŭ drameca. Li estis preta plenumi la deziron de *Lina*. Li iros ĉiujn tagojn al la *Comba*, ne por pli-malpli facila flirtado, sed

serene, kun atendanta sintenado, kun la celo observadi la *Cogull'ojn* kaj reteni *Lina'n* apud ili. La scivolemo estos pli pova ol ia eknaskiĝanta inklino por *Lina*. Ĉar se li enamiĝus, li ne plu klarvidus la kazon de la *Cogull'oj*, ĉiam pli maltrankviligan. Anstataŭ rimarki kiamaniere pro amo al sama virino suferas plenaĝulo kaj infano, kun la diversaj fenomenoj kaj nesuspektitaj sekvoj, li mem suferus, se li enamiĝus, kaj tiam forflugus ĉia ebleco pri observado. Li mem iĝus nova elemento de la kazo, kaj ĉi-tion li konsideradis maldigna. *Lina* estis tro vulgara por ke li risku sian superecon. Li vidigos al ŝi, iom post iom, ke al li oni ne tiel facile turnas la cerbon, kiel al la krudecaj *Cogull'oj*.

Ĉe lia alveno al la *Comba*, *Lina* observadis ĉe la ombro de juglandarbo, kiu staris ĉe la rando de la vojo, kelkajn paŝojn pli sube de la farmodomo. Evidente ŝi atendadis lin. *Cori*, venkita de la dumnokta nervemeco, estis foriĝinta por posttagmeza dormeto. *Andreu* kaj *Bielet* senfoliigadis la vinberujaron de la dekli-vo, preter la olivarbejo, por ke la suno kaj la aero plentuŝu la vinberojn kaj ili plejbone maturiĝu. *Teresa* mastrumadis interne de la farmodomo.

Lina kaj *Martí* disvolvis belan interparoladon sub la juglandarbo. La ombro estis bona, freŝa venteto blovis.

—Ni ne moviĝu el ĉi-tie — diris *Lina* —. Tio estas la plej bona loko. Ni estos aŭdataj de neniuj kaj povas esti vidataj de ĉiuj. Tiel neniuj el ili suspektos...

—Tio, kio plej interesas al mi — diris la studento — estas scii kiu el vi ambaŭ hodiaŭ matene diris la veron. Al mi ŝajnis — sincere — ke vi estas la mensogantino...

Lina konfesis. Estis vera tio, kion *Cori* estis dirinta. Aŭdiĝis bruo, oni intencis penetri en la ĉambron. Sed kian timon ŝi devis senti, sciante ke ili estas interne bone fermitaj? Estis vera, ankaŭ tio, ke viro senmova troviĝis antaŭ la farmodomo. Tiu viro estis *Bielet*, ne *Andreu*. Ŝi estis rekoninta lin, kiel nun ŝi rekonas *Martí'n*, kiun ŝi havas kontraŭ ŝi, plentage. *Cori*, pro la nervemeco, ne estis kapablanta distingi. Tio estis *Bielet*, la vere freneza pro ŝi, tiu kiu plej timigis ŝin. Ĉar la patro, ĉu pro la aĝo, ĉu pro la mallestimo de ŝi montrata, ĉu pro tio, ke li sin vidis ridinda pro sia enamiĝo, aŭ pro tio, ke li estas honta, jam komencis lasi ŝin trankvila. Kontraŭe, la junulo montriĝis ĉiam pli kuraĝema. Estis neimagebla afero. Nur ŝi, kiu tion vidis de proksime — ĉar la knabo malfidis al ĉiuj kaj kaŝis kiel eble sian pasion —, sciis ĝis kia ekstremo *Bielet* febras pro ŝi. *Lina* bedaŭradis esti, en la komenco, montriĝinta ion komplezema apud li. Ne grave, sed ŝi estis permesinta ke li premu al ŝi la manon, ŝi estis tolerinta iajn petolaĵojn; ian tagon la junulo kisis ŝin, kaj ŝi devus koleri pli ol ŝi faris. Ĉio kune ne havis ian gravecon. Sed kiu povus diveni...

Martí observadis ŝin ĝisfunde, sed kaŝe, por ne suspektigi ŝin. Ŝajnis al li, ke *Lina* nur duone diras la veron.

—Ĉar vi estas kun mi tiel sincera, — li diris — mi dezirus scii alian aferon: tiu ekkrio, tiu sveno kaj tiu serpento...

Lina ekridis. Tuj ŝi estis kompreninta, ke *Martí* ne englutis la mensogon. Ne ekzistis tiu serpento. *Andreu*, kiu fosadis en la legomejo, sin estis ĵetinta sur ŝin, kvazaŭ ebria, kaj ŝi vere — kaj tiam ŝi ne mensogis — estis sentinta grandan ektimon.

—Nu, *Lina*, kiel vi povas tion toleri? Kia intereso la via, kaŝi la veron?

—Ĉar mia fratino estus volinta foriri tiun tagon, kiel ŝi volis foriri hodiaŭ.

—Kaj vi ne sentas avidon forlasi lokon kie vin minacas la furiozaĵoj de du tiaj barbaroj, kiaj estas la *Cogull'oj*?

—Antaŭe mi ja volis foriri. Nun, ne.

—Kial nun ne?

—Tial ke vi ŝirmos min de ili.

—Vi aljuĝas al mi povon, kiun mi ne havas. Mi supozas, ke vi bezonas nek min, nek iun ajn, por vin gardi.

—Kompreneble ne. Sed se ia danĝero estis, nun ne estas. Via ĉeesto gardas min, mi estas certa.

—Ŝajnas al mi, *Lina*, ke vi ŝatas ludi kun fajro.

—Jes, iam.

—Ĉu vi ne timas brulvundon?

—Ne multe.

—Atentu, *Lina*, ke vi suspektigas min, ĉu vi incitis la patron kaj la filon.

—Ne tiom...

—Almenaŭ, konfesu, ke, malgraŭ ĉio, al vi plaĉas esti ŝatata kun tioma perforto de la *Cogull'oj*.

—Ĝi estas sovaĝa afero...

—Kiun vi sentime vidas alproksimiĝi...

—Anstataŭ timigi min, ĝi min amuzis.

—Vi, do, konsideras tion kiel spektaklon.

—Kiel ion similan.

—Ĉu vi ne komprenas, ke tio estas danĝera ludo?

—Ĉiam ŝajnis al mi, ke la fulmotondro estas malproksima.

Ĉu ne rezultis nekomprenebla tiu virino ŝajne tiel vulgara? *Martí* ne povis finfine kompreni la intencojn de *Lina*, precipe kiam ŝi insiste ripetadis tiujn vortojn: — Vi gardos min —. Li decidis aliflanke ataki.

—Vi, *Lina*, havas fianĉon. Oni diris al mi, ke vi edziniĝos ĉi tiun vintron...

—Mia fianĉo? Ĉu mi iam parolis al vi pri li?

—Aliaj parolis pri li.

—Mi deziras ke inter vi kaj mi ne venu li malhelpi — diris *Lina* ridetante, evitema.

—Vi ne amas lin...

—Ekzistas neblaj aferoj.

—Sed ĉu vi edziniĝos kun li?

—Kompreneble, se ne estas ia rimedo...

Kiaj malnoblaj virinoj! — pensis Martí. Sed li ne kontentiĝis per tiuj malprecizaj respondoj.

—Kiu estas via fianĉo?

—Vi demandas kiu estas, aŭ kia li estas?

—Efektive, kia viro li estas?

—Li estas vidvo. Riĉa. Korpulenta, grasa, malrapidema. Ĉu estas al vi sufiĉaj tiuj-ĉi informoj? Ĉu vi volas, ke mi ankoraŭ pli hontu per pliaj detaloj pri li?

—*Lina*, pro Dio! Se vi pensas, ke tiu estas mia intenco...

Lina estis ruĝa kaj plorema. Dolora furiozo fajrerumis ĉe ŝiaj okuloj. Furiozis en ŝi la emo malaltiĝi, malhonorigi preskaŭ, kaj ŝi plezuradis humiligi sin, groteske pentrante sian fianĉon.

—Ne pensu — ŝi diris kun kreskanta ĉagreno — ke li estas junulo eleganta kaj iluziiga kiel vi. Li estas kvardekkvinjara, li ŝajnas rano, li estas komercisto, havas la magazeton sub nia etaĝo. Mia fratino kaj mi kune ridis je lia grasa korpulenteco kaj je lia troampleksa pantalono, kiam ni ekvidis lin venantan al la magazeno. Kaj, jen, ian tagon li igis ke oni diru al mi, ke se mi lin akceptos, li edziĝos kun mi, ke li havas bonan moneramason kaj ke li traktos min kiel reĝinon... Mi respondis jese, kun la celo fini tiun stultan vivadon, kiun mi faras apud mia fratino. De junaĝo ni estas solaj. Ni vivas izolitaj. Mia fratino estas bigota. Por ke oni opiniu nin honestaj, ŝi tiom troigis la aferon, ke ni vivas malgaje. Ni ne ĉeestas teatrojn, nur de tempo al tempo kinon. Tie ni lernis esti elegantaj kaj, tial ke ni ne estas riĉaj, ke ni devas labori por vivi, ĉiuj nin konsideras afektulinoj. Mia fratino, nekomprenoble por mi, kvankam bela, ĉar tion oni ne povas nei, apartigas la virojn de si; mi pensas, ke tio okazas pro ŝia malbona karaktero, kiu montriĝas sur ŝia vizaĝo. Al mi, neniu agrabla junulo venis ankoraŭ por paroli pri amo. Ĉiam venis al mi maturaj viroj, masivaj dikuloj kun vizaĝo de promeneja gardisto, sinjoroj kiuj rezultis esti policanoj, urbogardistoj, malsantaj mizeruloj aŭ viroj korpulentaj kiel kolportistoj. Neniam, unu el tiuj junuloj ĉe kies vido ni pensas: Jen iu, al kiu mi tuj respondus jese — alproksimiĝis al mi por diri vorton...

(*Daŭros*)

JOAN PUIG I FERRETER

El la kataluna trad. Artur DOMÈNECH MAS.

OFICIALA PARTO

La nuna *Direkta Komitato de K. E. F.* konsistas el S-roj: Joan Gili Norta, prezidanto; Manuel Rodellar; Eduard Capdevila; A. Domènech Mas; J. M. Coll; Josep Cantó.

La *Eldona Fakto de K. E. F.* estas gvidata de S-roj S. Alberich Jofrè, Eduard Capdevila, Joan Gili Norta, Jaume Grau Casas kaj Manuel Rodellar.

La naŭan de aŭgusto okazis eksterordinara ĝenerala kunveno por ŝanĝi la regularon. Interalie, oni unuanime alprenis la decidon redoni al nia organizaĵo la nomon "KATALUNA Esperantista Federacio", anstataŭ la nomo "KATALUNA-BALEARA Esperantista Federacio" elpensita de kelkaj oportunistoj kiam la Aŭtoritato malpermesis al ni, dum la lasta Diktatoreco, simple nomi nian federacion *kataluna*.

NIA PREZIDANTO

Nia kara amiko Joan Gili Norta, Prezidanto de la Federacio, somerrestas en El Miracle kaj refortiĝadas post la grava malsano kiun li suferis. Ni deziras al li plenan resaniĝon kaj esperas ke li baldaŭ povos, inter ni, dediĉi kiel ĉiam siajn energiojn al la esperantista movado.

ENLANDA MOVADO

Ofte ni aŭdis plendojn, ke nia gazeto estas tro prefere literatura kaj ne sufiĉe informas pri la esperantista movado.

Ni petas la Grupojn regule sendi al ni, Esperante redaktitajn kaj maŝine skribitajn, koncizajn informojn pri la societa vivo, kaj volonte ni publikigos ilin.

NEKROLOGO

La agema samideano Pere Costa, prezidinto de nia kongreso en Santa Coloma de Farnés, mortis en lasta Junio. Al la funebranta familio kaj al la grupo "Esperanta Idealo" ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn.

En la lasta Julia monato, dum sama tago naskiĝis kaj mortis filineto de gesamideanoj Josep Grau Casas kaj Concepció Puig de Grau. Al la doloriĝintaj gepatroj kaj ceteraj familianoj ni esprimas nian simpatian.

EDITORIAL ATLANTE

Diputació 344 - BARCELONA

TELÈFON 52103

GRAMÁTICA Y VOCABULARIO ESPERANTO, pel Dr J. Bremon Masgrau. 1 volum enquadernat en tela: 4 ptes.

VOCABULARIO ESPAÑOL-ESPERANTO y VOCABULARIO ESPERANTO-ESPAÑOL, per F. Pujolà. 2 volums enquadernats en tela: 3 ptes. un. Tots 2 vocabularis en un sol volum: 5 ptes.

QUIERE VD. APRENDER ESPERANTO? - 65 cèntims

NOVAJ

AMAJ POEMOJ

DE

JAUME GRAU CASAS, L. K.

PREZO: UNU PESETO

TURNU VIN AL S-RO JAUME GRAU CASAS

DIPUTACIÓ, 50 - BARCELONA

IBERIA ESPERANTISTA REVUO

DIPUTACIÓ, 50 - BARCELONA

REDAKTATA EN ESPERANTO

KAJ EVENTUALE EN LA KVAR IBERIAJ LINGVOJ: HISPANA,
PORTUGALA, KATALUNA KAJ BASKA

DUMONATA 48 P. (16 × 22 cm.)

LITERATURO :: INFORMADO :: PROPAGANDO

DIREKTORO - ELDONANTO:

JAUME GRAU CASAS, L. K.

APEROS EN JANUARO 1931

JARABONO:

POR IBERIO: 9 PESETOJ

POR ALIAJ LANDOJ: 1 DOLARO

SCIIGU TUJ VIAN ABONON!

ABONPAGON VI FAROS POST RICEVO DE LA UNUA NUMERO